

La etapoj de la svisa federalismo, II

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 509, 1981.08.27 & 29

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En sia alianco de 1270, kiun ili renovigis en 1291 kaj 1315, la federigintaj civitoj Uri, Schwytz kaj Nidwald cedis parton de sia aŭtonomeco profite al la Ligo. Kiel ni raportis la pasintan semajnon, ili solene promesis, ke "okaze de konflikto inter du civitoj, la tria civito devos aŭtomate interveni kiel arbitracianto. Kaj ke se unu el la konfliktantoj ne akceptos tiun arbitracion, tiu tria civito devos militi kontraŭ ĝi apud la konfliktanto, kiu akceptos la arbitracion."

A.- Kiel ni diris la pasintan semajnon, la estroj de Uri, Schwytz kaj Nidwald faris grandan malkovron. Ili malkovris vakcinon kontraŭ la viruso de la naciismo. Per arbitrado devis solviĝi la konfliktoj, kaj la konfliktantoj rezignis je la rajto memjuĝi la propran kaŭzon. La ligo kreskis. Ekde 1353 ĝi grupigis 8 kantonojn, inter kiuj Berno, kiu ludis pli kaj pli la rolon de gvidanto de la ekstera politiko.

Cl.- Sed la duka familio de Habsburg reagis kontraŭ tiu ekspansio de la Svisa Federacio. En la batalo Sempach mortas la Duko Leopold tria de Habsburg, kaj du jarojn poste, lia frato Alberto tria de Habsburg fine agnoskas la juran sendependecon de la Svisa Konfederacio. Ni estas en 1388.

A.- Kun tiu sendependiĝo komenciĝis grava krizo. Fakte la bezono sin defendi kontraŭ la Duko de Habsburg unuigis la svisojn. Kun la agnosko de ilia sendependiĝo fare de la duka familio fakte malaperas por la svisoj la komuna malamiko. Aŭtomate akriĝas la internaj konfliktoj, kiujn kaŭzas la kunekzistado de demokrataj kaj aristokrataj reĝimoj.

Cl.- La demokrataj kamparanoj vidas danĝeron en la aristokratismo, kaj la aristokrataj regfamilioj sentas malestimon por la elektitaj estroj de la kamparanaj civitoj.

A.- En la civito Zug kreskgis la rivaleco inter la urbaj regfamilioj kaj la kamparanaj komunumoj. En la aliaj kantonoj, ĉiu aŭtomate simpatias al la samklasanoj. Oni troviĝas antaŭ peniga elekto: ĉu observi la pakton, kiu malpermesas intervenon en la aferojn de la ceteraj federitaj civitoj? Ĉu obei al la klas-solidareco? Estas grava dilemo.

Cl.- La 22-an de oktobro 1404 Schwytz-a armeo invadas la urbon Zug. La Schwytzaj kamparanoj obeante al siaj klasaj sentoj venas helpi la Zugajn kamparanojn kontraŭ la urbaj regfamilioj.

A.- La reago de la Dieto de la Ligo estas tuja kaj energia. Ĝi restarigas la urban registaron kaj nuligas la ligan inter la civito Schwytz kaj la kamparanaj komunumoj de Zug. En posta fazo per arbitrado oni malaperigas la konfliktojn dank'al juraj decidoj. La tiamaj arbitrantoj tiel objekte solvis la konflikton, ke ducent kvindek jarojn poste, okaze de la civila kamparana milito, Zug konos nenian konflikton inter la kamparanoj kaj la urbanoj.

Cl.- La juna Svisa Konfederacio de 1404 fakte faris grandan malkovron. Ke federacio povas ekzisti, nur se la diverseco estas akceptata kiel principo kaj idealo.

A.- Ĝi malkovris, ke federalismo signifas absolutan rezignon al la volo al potenco kaj al regado super la ceteraj paktanoj, profite al la volo pri solidareco. Estas kontraŭstaro al natura determinismo, kiu volas, ke la plej forta regadu la aliajn.

Cl.- Ni havas tie ĉi la ĝermon de la principo de neŭtraleco.

A.- Konfliktoj inter la kamparanoj kaj la urbaj regfamilioj ankaŭ disvolviĝis ekster la Svisa Ligo. En la orienta parto de la nuna Svislando kamparanoj provis sin liberigi de la regado de la Sankt-Galla Abato. En la alianca Ĉarto, kiu ligos tiujn ĉi Appenzell-anojn al la svisaj kantonoj, oni trovas interesan paragrafon, kiu pruvas, ke la Zuga konflikto portis fruktojn. Jen tiu ĉi paragrafo:

Cl.- "Ni, Appenzellanoj, okaze de konflikto en la Eederacio, neniam rajtos alporti ian ajn helpon al iu aŭ alia partio, escepte se estas per delegado de civitanoj fake kompetentaj por provi restarigi la konkordon." Tiu ĉi decido, kiu fakte neŭtraligas la civiton Appenzell estas plia paŝo al la koncepto pri neŭtralismo.

A.- La tiama Svisa Federacio estis organizaĵo tre kompleksa. Se apud la berna urso flirtas la Appenzella urso, tio tute ne signifas, ke ambaŭ civitoj havas la samajn rajtojn en la Federacio.

Cl.- Inter la teritorioj de Appenzell kaj Schwytz regadis Grafo de Toggenburg. Tiu ĉi grafo mortis sen lasi rektajn heredantojn, Pro tio li heredigis parton de sia teritorio al Schwytz. Sed la kantono Zürich ne volis akcepti tiun ĉi fakton. Al la civitanoj de Schwytz, kiuj aneksis la Valon Toggenburg, la urbo Zürich fermis sian merkaton.

A.- Schwytz tuj petis arbitracion. Sed la urbestro de Zürich, kiu estis nobelo, ne akceptis kunsidi kun kamparana landestro demokrate elektita. La konflikto inter la aristokratismo kaj demokratismo prenis novan formon. La Dieto avertis, ke normalaj rilatoj inter Zürich kaj Schwytz tuj devas esti restarigitaj, kaj ke la kantono, kiu ne obeos al tiu decido, estos konsiderata kiel kulpulo.

Cl.- Zürich rifuzis obei tiun ĉi averton. Unuanime la demokrataj kaj la aristokrataj kantonoj apogis la kantonon Schwytz, deklarante militon al Zürich. Dum dek jaroj regis terura civila milito ĉefe ruiniga por la kamparanoj. Dum la vilaĝoj brulis, Zürich alvokis la helpon de la Habsburga imperiestro Frederiko tria. Tio signifis unuflankan ekzigon el la pakto, kio jure ne estis ebla.

A.- La Imperiestro profitis tiun alvokon por internaciigi tiun konflikton. Li alvokis la helpon de la franca reĝo Karlo la sepa. La svisa armeo estis venkita de la franca armeo. Por eviti francan okupadon la urbo Zürich decidis forlasi la armilojn por reveni al arbitrado.

Cl.- Tiu ĉi arbitrado kulpigis Zürich. Sed ĝi kondukis al la malkovro de nova principo. Tiu de la egaleco de la neegaluloj.

A.- En federacia ligo kiel la svisa:

- a) urba civito egalas kamparanan civiton.
- b) aristokrata civito egalas demokratan civiton.
- c) granda civito egalas malgrandan civiton.
- d) riĉa civito egalas malriĉan civiton.

Nek la reĝimo, nek la nombro de la loĝantoj, nek la teritoria vasteco, nek la ekonomia forto rajtas influi tiun egalecon.

C1. — Tio estis nova kontraŭstaro al natura determinismo, kiu volas, ke la plej fortaj regadu la aliajn.

A.- La franca revolucio malkovros la egalecon de la individuoj.

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. La venontan semajnon gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos sian prezenton pri la etapoj de la svisa federalismo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*